

Unua: Vizaĝo

Sur la stampo de la vizaĝo oni povas observi kiel la nazo estas eksteraksa, eble pro bastonbato (tio pli bone videblas en la negativo kaj en la tridimensia bildo): Jesuo troviĝas en la hejmo de Kajafas kaj, pridemandita pri sia doktrino, respondas:

“21 Kial vi min demandas? demandu tiujn, kiuj aŭdis, kion mi parolis al ili; ili ja scias, kion mi diris. 22 Kaj kiam li parolis tion, unu el la apude starantaj oficistoj per la manplato frapis Jesuon, dirante: Ĉu tiel vi respondas al la ĉefpastro? 23 Respondis Jesuo al li: Se mi malbone parolis, atestu pri la malbono; sed se bone, kial vi min frapas?” (Joh 18, 20-22)

Krome oni povas rimarki diversajn sangokrumelojn sur fronto kaj sur la haroj: en la centra parto de la frunto, *kurta vejna sangogrumeleto laŭforme de 3 renversita*, sekva al lezo de la frunta vejno sciencolingve dirita *“preparata”*; ĉe la harbordo; *du grumeletoj de arteria sango fluas* el vundo kiu lezis la fruntan branĉon de la supra dekstra tempia arterio; *lezo de la frunta sekcio* de la supra maldekstra arterio.

La distingo inter vejnoj kaj arterioj (malkovrita en la medicino en 1595 de Andrea Cesalpino (kaj pliklarigita de William Harvey en 1628) evidentiĝas el la maniero per kiu la sango elfluas, pro gravito unukaze kaj male per propra premo alikaze. La bastonbato estas klare videbla en la foto de la vizaĝo en kiu evidentas la nazo eksterasa. Estas ankaŭ spurebla la direkto de la bato, plibone evidencigita en la tridimensio




Dua: Nuko

Sur la nuko elmontriĝas multnombraj hemoragiaj eventoj similaj al tiuj fruntaj. La dornoj, profunde enpikiĝintaj, eble lezis kelkajn branĉojn de la okcipita arterio kaj iujn profundajn vejnojn: la sango, fakte, prezentas karakterojn vejnajn-arteriajn.

Lezo de vejnoj kaj arterioj estas ŝuldeblaj al la tieldirita perdorna kronado.



"Tiam la soldatoj de la provincestro, kondukinte Jesuon en la palacon, kolektis al li la tutan kohorton. 28 Kaj ili senvestigis lin, kaj surmetis al li skarlatan mantelon. 29 Kaj ili plektis kronon el dornoj kaj metis ĝin sur lian kapon, kaj metis kanon en lian dekstran manon; kaj ili genuis antaŭ li, kaj mokis lin, dirante: Saluton, Reĝo de la Judoj! 30 Kaj ili kraĉis sur lin, kaj prenis la kanon kaj frapis lian kapon."
(Mt 27, 27-30).





Tria: Dornoj

La dornoj formantaj la “kasko-kronon” premitan sur la kapo de la homo de la Mortotuko eble estis tiuj kiujn botanikistoj konas per la nomo “*Zizyphus spina Christi*”, fote ĉi-sube ilustritaj. Tiuj dornoj havas jenajn propraĵojn: se delikate premitaj, ili sin pleksas, sed ne penetras, se, male, subite premitaj, dolorige penetras kiel pingloj.




Kvara: Skurĝilfrapoj



La korpo de la Homo de la Mortotuko estas stelumita per vundoj kaj kontuzoj. Scienca esplorista *Barbet* je ili nombris pli ol mil, eble ili proksimiĝas al 120. Ŝajnas ke la sola vizaĝo ne estis tuŝita de skurĝiloj (aŭ ilin ne eblas vidi pro la multaj sangaj makuloj). Kie plej oni frapis okazas sur la ŝultra kaj glutea zonoj

"14 Estis la Preparado de la Pasko, ĉirkaŭ la sesa horo. Kaj li diris al la Judoj: Jen via Reĝo! 15 Ili kriegis: Forigu, forigu, krucumu lin. Pilato diris al ili: Ĉu mi krucumu vian Reĝon? La ĉefpastroj respondis: Ni ne havas reĝon krom Cezaro". (Gv 19, 14-15)



Kvina: Skurĝiloj

Tiu en la figuro estas tipo de skurĝilo kies kontuziloj kiuj, se surmetitaj sur la stampitaj vundoj, kun ili konfruas.




Sesa: Kronado kaj skurĝado

Spurante la postsignojn oni rekonis alian tipon de skurĝilo, kie batiloj estis provizitaj je pli senhaŭtigaj pikiloj. Skurĝilbato, tial, krom kontuzo, kaŭzis ankaŭ haŭtoŝiradon. Estis, tial, du la skurĝantoj je malsama staturado dum skurĝito montradis al ili la vundeblan dorson.


Kronado kaj skurĝado



Li havas la kapon dornokronita



Ĉiuj korperoj estis skurĝitaj krom la vizaĝo



Sepa: Irvojo de la kondamnito

La mortotuka bildo registris kiel devis esti la irvojo de tiu homo al la loko de la mortiga torturo. La ŝultroj estas frotitaj pro la pezo de la *patibulum* (kruca horizontala palo) portata de la kondamnito, deklive ĉi-kaze. Ĝi eble longis unu metron kaj sesdek centrimetrojn.

La dekstra zigomo, la brovoj, la frunta centro, ambaŭ genuoj kaj iomete ankaŭ la maldekstra zigomo raportas pri evidentaj signoj de profalaj kontuzoj, almenaŭ tri. La evangelio pri tio allasas nedirektan konfirmon. (Joh kaj Lk) .




Oka: Krucumado

"Alveninte al I loko Kalvario, oni lin krucumis" (Luko).

La praktiko de la krucumo estis multe vastigita en la antikvaj tempoj.

Herodoto reirigas al la Persoj de la 5a jarcento aK tian kruelan mortigistemon; tia praktiko disvastiĝis al Malgranda-Azio ĉe la Grekoj kaj en Afriko ĉe Kartago. Historio raportas pri miloj da krucumitoj, en la printempo de la jaro 71 aK, dum la ribelo de Spartako, kiam ĝis 6000 mil sklavoj estis krucumitaj laŭlonge de la vojo Appia ordone de M. Licinio Crasso; romianoj intensigis tiun praktikon dum la sieĝo, kaj postmilite, de Jerusalemo de la jaroj sesdekaj a.K.

La krucumitoj povis rezisti laŭlonga tempo, ankaŭ plurtage. Por ilin igi mortaj oni rompis iliajn kruojn. Pri tio restas dokumento pri la krucumo de *Giv-at-Mivtar* (najbare de Jerusalemo), kies en la kvadrato eblas vidi la kruojn rompitajn. La krucuma praktiko estis abiliĉita de Konstanteno kaj ne plu leĝe praktikita.



Naŭa: Piedoj




La du piedoj estis najlitaj krucigite: la maldekstra sur la dekstra kiu rekte apogiĝis sur kruca palo.



Deka: Stampoj de la piedoj


La dekstra piedo (en la pozitivo estas la maldekstra) lasis kompletan stampon de la maldekstra piedo, dum de la maldekstra vidiĝas nur la spuro de la kalkano kaj tiu de planda kavo, ĉar la piedoj estas surmetitaj kaj fiksitaj per unusola najlo.



Dekunua: Manoj kaj brakoj


Sur la Mortotuko la brakoj estas krucigitaj kaj la madekstra mano parte kovras la dekstran. La vundo staras sur la karmo, nome inter la pojnaj ostetoj, kaj ne sur la polmo kiel en artaj reprezentaĵoj. Estis studita kaj eksperimentita la loko de la najlo: ĝi estas la tiedirita "spaco de Destot", kie la najlo povas sufiĉe facile pasi vundante tamen la nervon *tenar*, sensa-mova, kiu, se trafita, retirigas la dikfingron kaj kaŭzas angoran spasmon.

En neniu el la du brakoj la sangaj elfluaĵoj estas ortaj al la membro. La dekstra antaŭbrako estas laŭirita de sangaj rojetoj, kiuj interrompiĝas kaj sekciĝas laŭirante la direkton de la longo; la maldekstra male prezentas du ievojn malsamajn, ambaŭ oblikvajn.



Dekdua: Pozicio sur la kruco

La sangaj elfluaĵoj permesas rekonstrui la pozicion sur la kruco: la du brakoj figuras malsamajn angulojn kun la patibulum (horizontala ligno), kiuj tamen ŝanĝiĝis pro la movo de levado kaj mallevido necesaj por igi ebla la elspiradon kaj la inspiradon kaj eviti asfiksion.




Dektria: La fendo sur la flanko

“Sed kiam ili venis al Jesuo, kaj vidis, ke li jam mortis, ili ne rompis liajn kruojn; tamen unu el la soldatoj per lanco pikis lian flankon, kaj tuj elvenis sango kaj akvo”. (Joh 19,33-34)

La vundo kaŭzita per la lanco sin klare vidigas (same kiel la vundoj de la manoj kaj piedoj), dekstre, sur al antaŭa parto de la brusto inter kvina kaj sesa ripo. Ĝi havas ovoidan formon kun mezuro de longo cm 4,5 kaj larĝo 1,5.

Ĉirkaŭ la vundo vidiĝas vastigita sanga makulego, parte detruita pro la incendio, kun dimensioj de cm 5x15. Problemo, laŭ Baima Bollone, naskiĝas kiam oni serĉas la originon de la sango kiu postmorte, en la korpo, deseriĝis (la sero separiĝis) kaj poste eliris tra la perlanca vundo. Laŭ li, plej probablas ke temas pri elversado de sango antaŭe akumulita en la pleŭra kavo kaŭzie de kelkaj traŭmoj suferigitaj al Jesuo dum la pasiono. La lancobato antaŭe pelfluigis la ruĝan parton kaj sekve tiun seran, guste kiel rimarkas Johano, **”sango kaj akvo”**.



Dekkvara: Sangaj fluoj

Komence ĝi elfluis vertikale kaj poste, kaŭze de la dekrucigo, horizontale, kaj desegniĝis tiu “sanga zono” kiun oni povas observi transversanta la lumban zonon en la dorsa stampo, kun la sama separado de la parto sera el tiu ĉela.



Dekkvina: Rekonstruo de la fendo

Rekonstruo kaj evidentigo de la lanca frapo, de la vundo trudita al la homo de la Mortotuko kaj la elfluo de sango. La sango de tiu vundo dokumentas ke tiu homo estis certe jam morta kiam li estis envolvita en la tuko. La sango, fakte, tiel premita kaj platigita estas en la fazo de malkombiniĝo: estas sango de kadavro.

